



**Veneno
frostigita**

Puraj plezuroj

**Religio en Japanio.
Ĉu budhismo?**

Viziti mikroŝtatojn



Baldaŭ komenciĝas la 30a eldonjaro de MONATO.

Por festi tion, MONATO havigos aron da avantaĝoj al siaj abonantoj.

Do rapide repagu vian kotizon, ĉar specialaj ofertoj en la jaro 2009 havigos al vi eblecon por regajni eĉ pli ol la tutan kotizon. Por ke vi certe ne maltrafu tion, vi trovas ĉi sube jam unuan avantaĝon: 20%-a rabato por la ĉi-sekvaj libroj! Se vi mendas la tutan kolekton vi jam realigas ŝparon de 15,60 eŭroj!

- | | | |
|--|------------------|---------|
| • La asocio | 24,00 | 19,20 € |
| (baldaŭ aperos, sed jam nun antaŭmendu/ priskribo ĉi-sube) | | |
| • Dormanta Hejmaro | 16,00 | 12,80 € |
| • Sur Parnaso | 12,00 | 9,60 € |
| • Mortiga ekskurso | 10,00 | 8,00 € |
| • Aventuroj de Pinokjo | 10,00 | 8,00 € |
| • Nigra Magio | 6,00 | 4,80 € |

Tiu ĉi oferto validas ĝis 2008/12/31 por MONATO-abonantoj, kiuj mencias tiun ĉi anoncon en sia mendo. Al la menciitaj prezoj aldoniĝos la reala afranko, kun minimumo de 3 eŭroj.



La Asocio

Finfine firmfundamenta historio!

Doktoro Ziko Van Dijk pretigis Esperantan libron, 304-paĝan. Ĝi ne estas “plena historio de Esperanto”, sed tamen de la plej grava parto de ĝi, nome la historio, sub la ombrelo de UEA. Kaj nepre estas vere la unua nia historio, kiu havas firman sciencan bazon. Ziko funde esploris ĉiujn gravajn dokumentojn en la Centra Oficejo, kaj ne nur tiujn dokumentojn, sed ankaŭ multajn kiujn li ricevis de aliaj instancoj. Granda avantaĝo estas ke en multaj “historietoj” ambaŭ partioj povis konigi siajn argumentojn, kiuj ofte ne estas troveblaj en nia gazetaro! Ĉe konfliktoj en nia asocio ja tre ofte okazas ke unu en la koncernataj partioj estas buŝumita, pro manko de diskoniga organo!

Kiu volas paroli pri Esperanto-historio, kaj ne nur klaĉi “el la nuko”, nepre bezonas seriozan studadon de tiu ĉi monumenta verko.

(pds)

Veneno frostigita

Kuiri gjoza-on estas iom penige. Necesas unue fari (aŭ aĉeti) kovraĵon el faruna pasto; poste oni devas prepari viandon kaj diversajn legomojn, volvi tiujn en la kovraĵon kaj fine friti la tutaĵon. Pro la peneco multaj nun aĉetas frostigitajn gjoza-ojn kaj hejme ilin fritas.



10

Ibisoj kaj cikonioj: reaperintaj birdoj



12

La japana ibiso havas la sciencan nomon Nipponia nippon kaj estas la sola birdo kun la vorto Nippon (Japanio) en sia nomo. La japana ibiso (ankaŭ nomata ruĝa ibiso) estas granda, bela birdo, 80 centimetrojn alta kun plumoj helruĝaj.

Viziti mikroŝtatojn

Antaŭ nur du aŭ tri jardekoj malmultaj irlandanoj estis sufiĉe bonstataj por povi ferii eksterlande. Sed nun la vivo de multaj el ili pliboniĝis danke al la tiel nomata „Kelta tigro”, la prospera konjunkturo, kiu sekvis la aliĝon de Irlando al la Eŭropa Komunumo (hodiaŭ Eŭropa Unio).



19

politiko

JAPANIO	8
Abrupta demisio – denove	

moderna vivo

FILMO	9
Kunlaboro mielmonata	
JUNULARO	9
Kie neglekto, tie delikto	
KLERIGADO	9
Instruistoj bezonataj	
Puraj plezuroj	9
NUTRADO	10
Veneno frostigita	
JAPANIO	11
Unue flegu la flegistojn	

medio

JAPANIO	12
Ibisoj kaj cikonioj: reaperintaj birdoj	
TRAFIKO	13
Pli ol aŭto: perspektivo kaj sinteno	

turismo

ĈINIO	14
Evoluanta filmejo Hengdian	

enigmo

Litera sudoku	16
Solvoj de la martaj sudokoj	16

spirita vivo

ENKETO	17
Religio en Japanio. Ĉu budhismo?	

eseo

TURISMO	19
Viziti mikroŝtatojn	

libroj

Teologia utopio	22
Japanio tra homoj	22

ŝerco kaj satiro

ĴURNALISMO	25
Kiel raportoj pri Afriko	

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	27

kiel pagi vian abonon de monato?

► Rekto al la eldonejo ...

> Per via FEL-konto.
 > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
 > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
 > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
 > El Usono por ordinara usona ĉeko.
 > Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
 > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
 > Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
 > Per bankĉeko tratisa je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	24	27	14,4	5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9	17
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5	9
Brazilo	EUR	24	27	14,4	5	9
Britio	GBP	39	42	23,4	4	7
Bulgario	EUR	26	29	15,6	5	9
Ĉeĥio	EUR	34	37	20,4	5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	40	70
Estonio	EUR	26	29	15,6	5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (or.)	EUR	46	50	27,6	5	9
Grekio	EUR	46	50	27,6	5	9
Hispanio	EUR	46	50	27,6	5	9
Honkongo	EUR	42	45	25,2	5	9
Hungario	EUR	26	29	15,6	5	9
Irlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5	9
Israelo	EUR	42	45	25,2	5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1460
Kanado	CAD	76	80	45,6	9	15
Kipro	EUR	34	37	20,4	5	9
Koreio	EUR	42	45	25,2	5	9
Kostariko	EUR	24	27	14,4	5	9
Kroatio	EUR	26	29	15,6	5	9
Latvio	EUR	26	29	15,6	5	9
Litovio	EUR	26	29	15,6	5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5	9
Malto	EUR	34	37	20,4	5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Norvegio	NOK	398	430	238,8	45	73
Nov-Zelando	NZD	105	110	63	11	19
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22	36
Portugalia	EUR	42	45	25,2	5	9
Rusio	EUR	24	27	14,4	5	9
Singapuro	EUR	42	45	25,2	5	9
Slovakio	EUR	26	29	15,6	5	9
Slovenio	EUR	34	37	20,4	5	9
Sud-Afriko	EUR	42	45	25,2	5	9
Svedio	SEK	466	499	279,6	49	86
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	15
Tajvano	EUR	42	45	25,2	5	9
Usono	USD	78	82	46,8	8	14
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5	9

► aŭ pere de peranto ...

> **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroŝerbo@esperanto.org.au.
 > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
 > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
 > **Brazila:** Brazilia Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
 > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
 > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
 > **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
 > **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
 > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi.
 > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
 > **Germanaj:**
 > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 > Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalin.net.
 > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
 > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
 > **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
 > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: novire-sp@eircom.net.
 > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
 > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
 > **Japania:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
 > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a

Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca
 > **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
 > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
 > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
 > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
 > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
 > **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
 > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
 > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
 > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
 > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
 > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
 > **Ruslandaj:**
 > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-grad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu
 > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbecckford@telkomsa.net.
 > **Svedaj:**
 > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleidorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Kapitalista „moralo”



Ni ja kutimiĝis al nutraĵoskandaloj, ĉiuokaze en mia lando, Germanio. Dum la pasintaj jaroj ĉiam denove konatiĝis iuj skandaloj pro ekzemple degenerinta viando, kiun, spite al danĝero por sano de homoj, monavidaj kapitalistoj vendis. Tiaj skandaloj okazis ankaŭ en Ĉinio, kie oni proponis venenitan porkviandon. Sed la nova skandalo, kiu okazis en Ĉinio, havas tute novan, teruran dimension, ĉar temas pri la plej sendefendaj estaĵoj, beboj. Oni aldonis akvon al lakto kaj ĥemiaĵon, kiu ŝajnigas normalan nutrovaloron. El tio oni produktis laktopulvoron. Sed la ĥemiaĵo aldonita estas venena, tiel ke pluraj beboj mortis kaj miloj malsaniĝis. Nekredeble, ke pro profiteco ĉinaj kapitalistoj riskas la vivon de beboj, sen iuj skrupuloj, transe de ĉia morallo! Sed la skandalo estas multe pli granda, ĉar la aŭtoritatoj sciis jam antaŭ la Olimpiaj Ludoj en Pekino pri la skandalo, sed ne informis la publikon, male subpremante ĉiajn komunikaĵojn. Tial patrinoj tute ne sciis pri la danĝero, tiel ke malsaniĝis miloj da beboj anstataŭ eble kelkaj cent – se la publiko estus informita. La komunista partio ne volis malheligi la belajn bildojn de la Ludoj, kiujn ĝi prezentis al la mondo. Do morallo mankis ne nur ĉe kelkaj kapitalistoj, sed ĉe ĉiuj instancoj ĝis la pinto de la partio!

Kiel io tia povas okazi? Ŝajnas, ke en Ĉinio kreskis socio, kiu perdis sian kompason por morallo. Vastiĝis evidente senlima avido je materia riĉeco, je ĉiu prezo. Tial ekzemple en tiu lando oni kopias ĉion, prestiĝajn okcidentajn aŭtomobilojn same kiel renomajn vestaĵojn. Ne mirige, ke el tia lando venas ankaŭ venena infanludilaro. (Bonŝance por la cetera mondo, la venena laktopulvoro vendiĝis nur en la lando mem, ne estis eksportita.) Plia skandalo estas, ke jam antaŭ jaroj mortis beboj pro venenita laktopulvoro; se tio nun ripetiĝas, tio montras, ke la komunista gvidantaro ne kapablas majstri la kompleksajn defiojn de konsumsocio. La partio, male, estas parto de la malmorallo sistema mem, parto de la problemo. La fenomenon de krima kapitalismo, cetere, ni konas el pluraj eks-socialismaj landoj, kie post enkonduko de kapitalismaj sistemoj aperis mafiaj strukturoj, ofte kun helpo de (eks)partianoj. Sed ili almenaŭ ne mortigis bebojn ...

Sincere via

Stefan Maul

Stefan MAUL

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

www.monato.net

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 29a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kasenda versio de MONATO por blinduloj, mendo ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

revizianto:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Shlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vis-spaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmaj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la konkerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono.
Telefono/faksilo (216) 297-0370.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzonj oni ne sendu al la redaktoro proprajinitate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-shi, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.
Rete: turismo@monato.net.

Israelo 60-jara (6)

Se daŭrigi unu pluan fojon la temon „Israelo 60-jara“, komentitan de Josef Šemer, jen sperto en Torino, kie okazas ĉiujare granda internacia libro-foiro kaj kien estas invititaj kaj kunvenigitaj verkistoj de unu lando kiel specialaj gastoj. Ĉi-jare, por festi la 60-jariĝon de Israelo, oni invitis israelajn verkistojn. Neantaŭviditaj kontraŭaj reagoj kaj pretekstoj en diversaj italaj urboj kaj el diversaj politikaj kaj kulturaj asocioj, precipe flanke de intelektuloj de la maldekstraj politikaj tendencoj, provis malhelpi tiun renkontiĝon.

Preskaŭ hazarde mi vizitis iun el tiuj prelegoj por vidi la „amasan“ – kiel anoncote – partoprenantaron, kiu, male, montriĝis kvindekda personoj. La prelegantoj ĉe ronda tablo asertis:

a) ke la palestinanoj estas rase hebreoj. Fakte, kiam araboj invadis Palestinon, ĝia hebrea loĝantaro estis duone kristana kaj duone juda. Ili iom post iom (precipe pro tio, ke nur islamanoj povis ne pagi impostojn ...) fariĝis islamanoj, vendante, praktike, sian identecon;

b) ke UN malrajte deĉevaligis palestinanojn;

c) ke palestinanoj estis praktike forigitaj, se ne buldoze enterigitaj sub siaj hejmoj. Unu preleganto montris fotojn (kiujn tamen mi ne klare vidis);

ĉ) ke Israelo devas reveni al la unuaj limoj kaj forlasi la setlejojn kaj dividi ĉiuspecan potencon kun la palestinoj, kaj, eventuale, „fariĝi gasta partnero“.

La publiko ŝajnis konsenti, krom kelkaj, kiuj proponis akcepti la faktojn kaj internacie zorgi, por ke pace kunekzistu du ŝtatoj. Eĉ iu el tiuj pretis pruvi, ke la hebreoj ne plu rajtas posedi la teron, kiu estis promesita kaj donacita al la popolo kredanta je la Dio de Moseo kaj la profetoj.

Dum la foiro la invititaj verkistoj partoprenis amase, evidente honorigitaj de la publiko, kiu ignoris polemikojn kaj kverelojn. Iuj verkistoj, marĝene de la manifestacio, sin deklaris kritikaj koncerne la politikon de sia israela registaro. Sed mi ne komprenis precize pri kio.

Armando ZECCHIN
Italia

Israelo 60-jara (7)

Mi pensas, ke estas erare voli scii, kiu pravas, kiu faris kion en kiu jaro, kiu komencis kaj kiu rajtas fari kion ...

Oni devas havi senpasian trankvilan historian rigardon kaj por la es-tonteco serĉi praktikajn solvojn, por ke homoj pli bone vivu. Simple.

Séverin TAGLIANTE-SARACINO
Francio

Israelo 60-jara (8)

Mi ne volas, kiel iuj, trovi pac-solvon anstataŭ la koncernataj popoloj. Tamen mi certas, ke ia ajn paco por tiu konflikto eblas nur, se la israelanoj komence petas pardonon pro la maljusta senkiala rabo de la palestina lando kaj la konsekvencaj suferoj. Post tia pardonpeto packonsento iel eblos.

Thierry TAILHADES
Francio

Israelo 60-jara (9)

Kiam la cionismo komencis agadi politike en Eŭropo, instige de Theodor Herzl, post la antisemita krizo en Francio pri Dreyfus, la politike maldekstra flanko de la juda popolo, i.a. la laborista sindikato Bund, atentigis la homojn pri danĝero krei ŝtaton tie sur raciaj bazoj, kiu povus okazigi senfinan militon. Ĉu ili ne iomete pravis? Oni ne forgesu, ke en la juda popolo ekzistas maldekstruloj, cent-roloj, naciistoj ktp ... Forta estis kaj ankoraŭ estas la batalo de ideoj inter judaj naciistoj kaj judaj progresemuloj. Dividi la mondon inter judoj kaj nejudoj estas prezenti malĝustan vidpunkton.

La historio vidita de Josef Šemer estas ne malvera, sed tamen iomete idealigita, ĉar li forgesas pri teroristaj grupoj de naciistoj, kiuj ekzemple eksplodigis la hotelon Reĝo David (grupo Irgun, 91 mortintoj, inter kiuj britoj, araboj kaj judoj) inter multaj aliaj terorismaĵoj.

La vera kaj nura solvo estas, ke la homoj devas vivi sen ŝtato kaj mem organiziĝi en respekto de kulturoj kaj tradicioj. Mi ne vidas ion alian por Israelo/Palestino.

Jean-Marc LECLERCO
Tuluzo

Ĉu osetoj ne rajtas sian Kosovon?

Kial albanoj kosovaj rajtas deklari sian landon sendependa, sed osetoj ne? Osetoj estas popolo loĝanta en Kaŭkazo. Ilia lingvo apartenas al la irana lingva familio. En la 12a kaj 13a jarcentoj la alanoj, la praavoj de nunaj osetoj, kreis sian ŝtaton, kiun ruinigis mongoloj, kaj poste la ŝtato ne renaskiĝis. En la 20a jarcento osetoj iĝis dividita popolo: norda Osetio en Rusia Federacio, suda Osetio en Kartvelio. Ĝis la 80aj jaroj de la 20a jarcento osetoj en suda Osetio povis parte efektivigi sian rajton je nacia memdifino. Sed en 1989 komenciĝis kartvela-oseta konflikto: la osetoj postulis firmigon de sia aŭtonomio, sed la kartveloj male klopodis ĝin nuligi. Rezulte de la militaj agoj en la jaroj 1990-1992 pereis centoj da loĝantoj kaj dekoj da miloj da kartvelaj kaj osetaj rifuĝintoj perdis sian hejmon. Al la jaro 1999 la ŝtata statuso de Osetio restis disputebla. La osetoj en Rusio havas sian ŝtaton, la respublikon Norda Osetio-Alanio.

Mihail Saakaŝvili, la prezidanto de Kartvelio, faris krimon, eĉ kelkajn. Li subigis Aĝarion, li militas kun Abĥazio, li detruigis la urbon Ĉinval. Li fakte estas peono de Usono.

Sergeo JURJIĆ
Rusio

Fariseeco kaj honesta fido

Islamano kun kaptuko (MONATO 2008/6, p. 11) certe estus bone akceptita en monaĥinejo. Tamen estas apenaŭ imageble, ke monaĥinoj estas permesataj preĝi en moskeo same normale, kiel en katolika kirko. Ĉu ni ĉi tie povas apliki niajn vidpunktojn ja same okcidentajn pri homaj rajtoj?

Eble estas diferenco inter ekstere brila fariseeco kaj persona, privata honesta fido. Tio kompreneble validu por ĉiu. Nepre la Biblio malpermesas juĝadon pri aliaj kaj memglorigon. Se ni estus pli modestaj, tiam ni ne pretendus regadon super aliaj sen eksplikitaj kompetentoj. Ion alian la mito pri Adamo kaj Evo ne signifas. Kaj homoj ĉiam montris sin malbonegaj regantoj precipe rilate al religioj.

Frieder WEIGOLD
Germanio

Katastrofaj ciferoj

de Stefan MAUL

Frapis min legant-letero pri aŭtomobiloj en mia ĵurnalo. La skribinto atentigis pri rilato inter pezoj de homo kaj aŭto: averaĝa aŭto havas 1,5 tunojn da ŝtalo kaj plasto por transporti homon 80-kilograman. La sama homo povas moviĝi per biciklo, kiu pezas nur 0,02 tunojn! Kiom da malŝparo de energio, li avertas. Krome, laŭ li, la plimulto de la aŭtoj preskaŭ tuttage staras senutile sur strato aŭ en garaĝo.

La skribinto atentigas pri alia grava faktoro: por atingi grandan rapidon, aŭto bezonas grandan, do pezan, motoron. Sed grandajn rapidojn oni bezonas ne ofte, ĉar dum la pliparto de la tempo oni veturas ja nur en urboj, kutime eĉ ne grandajn distancojn. Do, li konkludas, grandaj rapidoj utilas al neniu. Ili nur detruas malvastajn strukturojn kaj kvazaŭ kreas vastegajn strukturojn (ekzemple reton da aŭtovojoj), por kiuj oni fakte bezonas grandajn aŭtojn. Ni ne povas kontroli liajn indikojn, sed ili ŝajnas al mi probablaj.

Kiel konate, aŭtoj emisias grandegan parton de karbondioksido, kiu kulpas pri venenado de la atmosfero kaj konsekvence pri la tutmonda

varmiĝo. Certe, dum pasintaj jardekoj oni klopodis redukti tiun emisiadon per plibonigo de motoroj, sed ĉar draste plimultiĝas aŭtoj, precipe en tiel nomataj sojlojlandoj (ekzemple Ĉinio kaj Barato), la rezulto estas: la homaro produktis en 2007 tiom da karbondioksido, kiom neniam antaŭe dum la historio! Estis 36,5 miliardoj da tunoj, kio signifas kreskon je 2,8 elcentoj kompare al 2006. Dum la pasintaj dek jaroj la kresko estis entute 22 elcentoj.

Plej pesimisma

Tion ĵus komunikis la Tutmonda Karbon-Projekto (TKP). Kvar kvinonoj de karbondioksido estiĝas per bruligo de fosiliaj karburajoj (karbo, nafto kaj gaso). La reston kaŭzas precipe ekstermado de arbaroj. La esploristoj de TKP atentigas, ke la karbondioksid-emisio nun troviĝas konsiderinde super eĉ la plej pesimisma supozo de la lasta raporto de la monda klimat-konsilantaro. Sur ties bazo ĝi prognozis kreskon de la temperaturoj je 2,4 ĝis 6,3 celsiaj gradoj.

La TKP-fakuloj krome atentigas, ke en 2007 ĉirkaŭ 47 elcentoj de la emi-

siita forcej-gaso restis en la atmosfero kaj 53 elcentojn absorbis oceanoj kaj plantoj. Sed tiu kapablo de la naturo, redukti la kreskon de karbondioksido, iom post iom regresas. En jardekoj inter 1960 kaj 1990 maro kaj biosfero absorbis averaĝe 57 elcentojn, de post 2000 nur 54 elcentojn. Ankaŭ tial la venena gaso multiĝas pli kaj pli.

Ne plu haltigebla

Kion konkludi el ĉi ĉio? Unue ni povas konstati, ke ni ja jam delonge scias pri la problemoj, do la novaj indikoj estas tiom katastrofaj, tamen timigas. Ŝajnas, ke efektive ni devas definitive konscii, ke la tutmonda varmiĝo ne plu estas haltigebla, ke la klimato ne plu estas savebla. La dua konkludo do estas: temos nur pri tio, ĉu la homaro eble sukcesos iomete bremsi la evoluon. Por tio necesas multaj plej diversaj rimedoj kaj agadoj kaj en industriaj kaj en sojlojlandoj kaj en subevoluintaj landoj. Ni scias pri tiu longega listo da farendaĵoj, sed ni scias ankaŭ, ke naciismaj egoismoj tre ofte malhelpas efikajn paŝojn en la ĝusta direkto. Ni nur memoru, kiom longe bezonis la usona registaro por koncedi, ke la klimatŝanĝo estas fakto! Batali kontraŭ ĝi, laŭ Vaŝingtono, signifus damaĝi la hejman ekonomion.

En la antaŭa numero ĉi-loke mi atentigis pri neceso kaj ebleco redukti fosiliajn karburajojn favore al renovigeblaj energifontoj. Jen grava kontribuo por bremsi la klimatŝanĝon. Sed eĉ se ni energie aktivus por tio, daŭros jardekojn, ĝis ni vidos efikojn. Kaj, bedaŭrinde, ĵus atingas nin plia katastrofa informo: la antarkta ozontruo ĉi-jare estas tiom giganta, kiom neniam antaŭe! Sed jen ankaŭ iomete konsola ĵusa informo: la biciklo ĝuas renesancon. Pli kaj pli multaj homoj, kiel mi, rezignas pri aŭto favore al biciklado. Eble ili ankaŭ legis la komence cititan leteron en mia ĵurnalo ... ■



Aŭtoj emisias grandegan parton de karbondioksido

Abrupta demisio – denove

La 1an de septembro 2008 la ĉefministro Fukuda Jasuo anoncis sian demision. Fukuda ĉefministriĝis la 26an de septembro 2007, post subita ekŝigo de la antaŭa ĉefministro Abe Ŝinzoo.

Salutante sian ĉefministriĝon, Fukuda diris, ke lia estas „kabineto, kiu senelire batalas kun rivero malantaŭ si”, kio signifis, ke eĉ unu malgranda fuŝo dronigus la Liberalan Demokratan Partion (LDP). Verdire li ja dronigis sian partion pro sia abrupta, senrespondeca demisio.

Li klarigis sian demision tiel: „La plej granda opozicia Demokrata Partio (DP) forte kontraŭis ĉiujn gravajn leĝprojektojn en la lasta sesio. Se mi plu estos la ĉefministro, la samo okazos en la venonta sesio, tiel ke mi volas lasi tiun taskon al alia”.

Kialoj

Ekzistas ĉefe tri kialoj por la demisio. Unue, rilate Usonon, la politiko de LDP tute ne konvenas al la deziroj de japanoj, kiuj suferas pro malfacila vivo. LDP ĉiam direktas sin al Usono, sekvan-te ĝin kaj akceptante ĝiajn postulojn kiel subtenon al la Iraka Milito.

Due, LDP multe dependas de la partio Koomei, sen ties helpo ĝi ne povas venki en elektoj. Tamen Koomei hezitis subteni la ĉefministron rilate subtenadon de usona ŝiparo en la Hinda Oceano. Cetere ĝi postulis malaltigon de impostoj por malriĉuloj, de kiuj Koomei dependas. Fukuda ne volis akcepti malaltigon tian, sed devis, timante, ke Koomei ne plu helpos dum elektoj.

Trie, temas pri la nekapablo de Fukuda mem. Li fariĝis parlamentano je la



Samtempe perdis Japanio sian konfidon en la mondo.

aĝo de 54. Antaŭ ol ĉefministriĝi, li laboris kiel ĝenerala sekretario en antaŭa kabineto, sed li ne havis sperton kiel ministro. Ankaŭ de tiu ĉi posteno li fine demisiis.

Honoro

Lastatempe subtenis lin nur ĝis 30 % de la popolo. Oni kritikis lin, dirante: „Li parolas ĉion kiel fremdaĵojn”, kaj „Ni ne povas vidi, kion li volas fari”. Sume al li mankis gvidkapablo kiel ĉefministro. Ŝajne li pensis nur pri sia honoro, ne pri Japanio.

LDP devas elekti novan partiestron, sub kiu ĝi povos venki en la ĝenerala elekto. Tamen Abe kaj Fukuda demisiis same abrupte, ĝuste antaŭ parlamenta sesio. Tiel ili seniluziigis la popolon, kiu pridubas la regmanieron kaj la kapablon de la partio. Estos malfacile al la partio reakiri fidon inter la popolo. Samtempe perdis Japanio sian konfidon en la mondo.

Hori Jasuo



Estos malfacile al la partio reakiri fidon inter la popolo.

FILMO

Kunlaboro mielmonata

Antaŭ nelonge komenciĝis realigo de komuna albana-serba filmo La miela monato. Temas pri du paroj, unu albana kaj la alia serba, kuniĝintaj danke al elmigrado. Ĝi mesaĝas pacan kaj bonan kunvivadon kaj najbarecon, kaj modelas kiel komunikponto inter ambaŭ nacioj spertintaj almenaŭ dum la lasta jarcento tiom da malamikeco.



MAG3737

La scenaristo estas Genc Permeti el Albanio, kaj la reĝisoro Goran Pakalević el Serbio. La scenoj ludiĝas jen en Albanio, jen en Serbio, kaj jen ie en okcidento. Ne estis facile por la filmistoj trovi vojon al kunlaboro, sed nun ili kontentas kaj certas pri la sukceso de sia filmo.

Bardhyl SELIMI

JUNULARO

Kie neglekto, tie delikto

Ĉiu politika reĝimo havas siajn malbonaĵojn. Tuj post la oktobra revolucio en 1917 la juna sovetia respubliko ricevis novan problemon – nezorgitajn infanojn, kiuj abundis. Pasis multe da tempo por iom normaligi la situacion.

Jen denove. Aktualaj problemoj en Ukrainio similas tiujn de antaŭaj tempoj. Multas senhejmaj infanoj, neglektataj, kiuj konstante almozpetas, ĉu surstrate, ĉu en metroo. Abundas ankaŭ koncentrejoj ne nur por plenaĝaj sed ankaŭ aparte por junaj krimuloj.

Dmitrij CIBULEVSKI



DMITRIJ CIBULEVSKI

En prizonoj ofte troviĝas neglektataj junuloj.

KLERIGADO

Instruistoj bezonataj

Fine de la 15a jarcento fuĝis kelk-miloj da albanoj post la disfalo de la armeo komence al Bulgario kaj poste al Ukrainio. Nuntempe troviĝas almenaŭ 5000 iliaj posteuloj en la odesa provinco, kie ili konservis la lingvon, morojn, kostumojn kaj aliajn tradiciaĵojn de siaj prapatroj.

Ili festas ekzemple la tagon de Sankta Georgo, honore al Gjergj Kastrioti Skanderbeg, la nacia heroo de albanoj. Ĝenerale ili geedziĝas nur en sia komunumo, kaj, malgraŭ pli facila kontakto kun Albanio dum 1945-1961, kiam floris amikeco kun Sovetio, kaj post 1990, kiam ambaŭlande establiĝis plurisma politika sistemo, la tieaj albanoj plu restis en Ukrainio.

Rimarkindas, ke inter 48 milionoj da loĝantoj de Ukrainio travivas eta komunumo tia. Tamen nun la albanoj en Odeso bezonas lernolibrojn kaj instruistojn, kiuj verŝajne venos el Albanio. La devenlando, kvankam mem ankoraŭ ekonomie malforta, planas ilin komplezi – interkonsente kun la koncernaj instru-instancoj ukrainaj.

Bardhyl SELIMI

Puraj plezuroj

Laborantoj de kompanio, kiu purigas naĝejojn kaj fontanojn en la litova ĉefurbo Vilnius, ŝercas, ke ili povus longe listigi aĵojn, kiujn ili trovas. La plej oftaj objektoj, kiujn ili elprenas el filtradaj instalaĵoj, estas viraj kaj virinaj bankostumoj. Ilin sekvas kondomoj. Ankaŭ juvelojn, fajrilojn, trink-ŝalmojn kaj eĉ monerojn trovas la purigistoj. Tamen la plej impona trovaĵo en unu naĝbaseno estis vivantaj karasoj.

LAST

Veneno frostigita



Ĉi tiun manĝaĵon en Ĉinio oni konsumas aŭ boligita aŭ fritita kiel ĉefan manĝaĵon.

En Ĉinio ĝi estas konata kiel jiao-zi; en Japanio kiel gjoza. Ĝi venis al Japanio el nord-orienta Ĉinio post la dua mondmilito. Ĉi tiun manĝaĵon en Ĉinio oni konsumas aŭ boligita aŭ fritita kiel ĉefan manĝaĵon. En Japanio oni konsumas ĝin plej ofte fritita kun muelita viando, tuberoso, ajlo kaj ĉina brasiko kiel akompanan manĝaĵon apud bovlo da rizo.

Kuiri gjoza-on estas iom penige. Necesas unue fari (aŭ aĉeti) kovraĵon el faruna pasto; poste oni devas prepari viandon kaj diversajn legomojn, volvi tiujn en la kovraĵon kaj fine friti la tutaĵon. Pro la peneco multaj nun aĉetas frostigitajn gjoza-ojn kaj hejme ilin fritas.

Fine de 2007 kaj komence de 2008 34 homoj malsaniĝis, manĝinte frostigitajn gjoza-ojn el Ĉinio. La polico malkovris la venenon metamidofoso, organika fosfora kombinaĵo uzata kiel insekto-mortigilo. La veneno troviĝis ene de la saketoj aŭ ĉe la kovraĵoj kaj la ingrediencoj de gjoza-oj. Tial oni kre-

dis, ke ĝi enmiksiĝis ĉe la fabriko, kie la manĝaĵo estas preparata.

Viandaĵoj

La japana ministrejo pri bonfarto kaj laboro publikigis, ke ekde januaro 2007 19 japanaj kompanioj importis 3800 tunojn da manĝaĵoj kiel frostigitaj gjoza-oj kaj viandaĵoj el mezskala fabriko en Hebei-provinco, Ĉinio. La ministrejo admonis, ke oni ne aĉetu manĝaĵojn el tiu ĉi ĉina fabriko.

Reage, la ĉina polic-agentejo anoncis: „Ni pridemandis 55 laboristojn en la fabriko kaj faris ĉiajn ekzamenojn kaj eksperimentojn, kaj ni konkludis, ke preskaŭ ne eblis tiuj venen-miksaĵoj en Ĉinio.”

Siavice reagis japanaj vendejoj kaj restoracioj. Multaj superbazaroj akceptis, ke aĉetintoj de ĉinaj manĝaĵoj redonu siajn varojn, dum aliaj ĉesis vendi ĉinajn frostigitajn. La porfamilia restoracia ĉeno Skylark ĉesis uzi 73 specojn de ĉinaj manĝaĵoj. Respondeculo diras, ke la manĝaĵoj ne devenas de la koncerna fabriko en Hebei-provinco, sed klientoj timas ĉinajn manĝaĵojn ĝenerale.



Kuiri gjoza-on estas iom penige. Necesas unue fari (aŭ aĉeti) kovraĵon el faruna pasto; poste oni devas prepari viandon kaj diversajn legomojn, volvi tiujn en la kovraĵon kaj fine friti la tutaĵon.



Pro la peneco multaj nun aĉetas frostigitajn gjoza-ojn kaj hejme ilin fritas.

Lerneĵanoj

Instruada komitato en la urbo Koorijama, Fukuŝima, deklaris, ke ĝi ne uzos ĉinajn manĝaĵojn por prepari lernejanajn manĝaĵojn. Kvin horojn poste, tamen, ĝi nuligis la decidon, dirante, ke, se oni ekskludas ĉiujn ĉinajn ingrediencojn, ne eblas prepari pladojn kontentigajn por lernantoj.

Japanaj manĝaĵoj multe dependas de Ĉinio. Dum la pasintaj dek jaroj la importo 2,4-obliĝis kaj kvarono da manĝaĵoj venas de Ĉinio. Japanaj komercistoj trovas ĉinajn kompaniojn, kie eblas produkti laŭ japana normo. Danke al tiu ĉi sistemo, kaj al malmultekostaj laborfortoj, japanoj manĝas malaltpreze. Specialisto diras, ke portempe homoj evitas frostigitajn manĝaĵojn, precipe ĉinajn, sed baldaŭ ili revenos al sia antaŭa kutimo, ĉar oni konsideras grava malmultekoston de manĝaĵoj.

En junio 2008 la gjoza-oj produktitaj en la Hebei-fabriko kaj tie konservitaj pro la esploroj tamen estis konsumitaj kaj ĉi-foje venenis ĉinojn. La ĉina polic-agentejo komencis denove enketi. Laŭ raportoj, laboras en la fabriko 850 neregulaj dungitoj malkontentaj pro malbonaj labor-kondiĉoj.

HORI JASUO

JAPANIO

Unue flegu la flegistojn



Por esti agnoskataj en Japanio kiel flegistoj, ili devas en tri jaroj sukcesi en ŝtata ekzameno – en kvar jaroj por fariĝi prizorgisto. Se ili malsukcesos, ili devos reveni al sia hejmlando. Japanio konsentis akcepti 400 flegistojn kaj 600 prizorgistojn, tamen fakte la venintoj estis ege malpli multaj ol la celnombro.

Pacientoj

Ne ĉiuj organizaĵoj en Japanio subtenas la iniciaton. La Asocio de Prizorgistoj opinias, ke Japanio ne dependu de eksterlandanoj pri maljunul-prizorgo, ĉar malfacilos akcepti homojn el malsamaj kulturoj. Ankaŭ la Asocio de Flegistoj kontraŭas, opiniante, ke la unua tasko de la registaro estu aranĝi bonajn laborkondiĉojn por japanaj flegistoj kaj prizorgistoj. Ĝi dubas, ĉu eksterlandanoj povos bone kompreni la delikatajn esprimejojn de pacientoj.

Male, la Asocio de Maljunulejoj aprobas la projekton. Ĝi esperas, ke, se la eksterlandaj prizorgistoj estos glate akceptataj, kaj se venos pliaj novuloj el Indonezio, tiel solviĝos la problemo de prizorgisto-manko.

Tamen, se oni kredas, ke eksterlandanoj ne povos adaptiĝi al la japanaj cirkonstancoj, tio estas antaŭjuĝo, kiun japanoj ofte emas havi. Sed aliflanke estas espero tro optimisma, ke venos el Indonezio kaj aliaj landoj pli da homoj por prizorgi japanajn maljunulojn, ĉar la bazaj kondiĉoj por tiuj laboristoj estas malbonaj.

Lingvo

Krome Japanio havas pli malfavoran kondiĉon por eksterlandaj laboristoj ol aliaj landoj kiel Kanado, Israelo, Britio kaj Kuvajto, kiuj multe akceptas eksterlandanojn. En Japanio malhelpas la lingvoproblemo: trapasi fakajn ekzamenojn post tri aŭ kvar jaroj en fremda lingvo neniel facilas.

Laŭdire filipinaj virinoj direktas sin al Kanado, kie ili senprobleme povas uzi la anglan, kaj kie la kanada registaro proponas bonan trejnadon por akiri kvalifikaĵojn kaj kune la rajton tie civitanigi. Male en Japanio: tial ne surprizas, ke multaj kapablaj homoj preferas iri al Kanado kaj aliaj landoj.

La unua tasko de la japana registaro estas aranĝi kaj garantii pli bonajn kondiĉojn por instigi japanajn prizorgistojn denove labori en sektoro, por kiuj ili trejniĝis. Sen tio, trudi severan laboron kun malalta salajro al eksterlandanoj apenaŭ permeseblas.

HORI JASUO

Vivas en Japanio multaj maljunuloj kaj do furoras la „maljun-industrio”. Konstruataj estas ĉiam pli da maljunulejoj, al kiuj universitatoj kaj aliaj lernejoj sendas diplomitajn prizorgistojn. Tamen pro severaj laborkondiĉoj kaj malaltaj salajroj tiuj baldaŭ ĉesas tiel labori. Laŭdire ekzistas en Japanio 200 000 diplomitoj ne plu laborantaj en la sektoro.

Por solvi la mankon de prizorgistoj, la registaro decidis importi helpantojn el Indonezio. La unuaj 208 venis al Japanio en aŭgusto. Ili ĉiuj jam kvalifikiĝis kiel flegistoj. En Japanio ili lernos dum duonjaro la japanajn lingvon kaj kulturon. Poste ili eklaboros en hospitaloj kaj maljunulejoj.



La titolon „Ŝtelo iĝas kutimo” portis sur sia kovrilo la oktobra numero de MONATO. Eble tie kaptis sian inspiron ŝtelistoj, kiuj dufoje penetris en la eldonejon de MONATO ene de du semajnoj. Ŝtelitaj estis nur iom da moneroj, sed la damaĝo al pordoj kaj fenestroj estas konsiderinda.

JAPANIO

Ibisoj kaj cikonioj: reaperintaj birdoj

La japana ibiso havas la sciencan nomon *Nipponia nippon* kaj estas la sola birdo kun la vorto *Nippon* (Japanio) en sia nomo. La japana ibiso (ankaŭ nomata ruĝa ibiso) estas granda, bela birdo, 80 centimetrojn alta kun plumoj helruĝaj. En la Edo-epoko vivis multe da ibisoj en tuta Japanio kaj laste en insulo Sado, gubernio Niigata, sed post la dua mondmilito ili malmultiĝis, verŝajne pro la uzo de tro da insektmortigiloj. Kiam en 1952 la registaro komencis protekti la birdojn, ilia nombro estis nur 24. En 1981 oni kaptis la restantajn 6 birdojn kaj komencis flegi tiujn en protekta centro por plimultiigi ilin, sed vane. En 2003 la lasta japana ibiso en Japanio mortis en la aĝo de 36 jaroj (100 jaroj

por homo). Poste Ĉinio donacis paron al Japanio kaj oni komencis flegi tiujn en la centro kaj sukcesis elkovi la idojn, kaj nun la nombro atingis 122. En 2003 la buroo pri medio celis, ke 60 ibisoj vivu en naturo ĝis 2015.

La 25an de septembro Ibisa Protekta Centro liberigis 10 individuojn (1-3-jarajn, 5 masklojn kaj 5 inojn) en la naturon. Tiuj trejni sin ekde julio 2007 pri flugado kaj nutraĵkaptado. Ili estis ekipitaj per birilo.

Cikonioj

Simila provo jam okazis en la urbo Tojooka en la gubernio Hjoogo pri cikonioj. Japanaj cikonioj ekstermiĝis en 1971, kaj poste oni komencis flegi dona-



La japana ibiso estas granda birdo kun helruĝaj plumoj.

citajn kaj eleksterlande alflugintajn, kaj sukcesis havi 100 cikoniojn en 2005. En septembro de la sama jaro oni liberigis 5 cikoniojn, kaj en majo 2007 oni trovis idon en la nesto sur 12,5 metrojn alta turo. Tio okazis la unuan fojon dum la pasintaj 43 jaroj. Nun pli da idoj naskiĝis kaj la liberigitaj cikonioj vivas sovaĝe. La urbo famiĝis pro la cikonioj, tiel ke multaj turistoj vizitas la parkon „Vilaĝo de cikonioj”. Ankaŭ la ekonomia efiko estas granda. Terkulturistoj produktas sen uzo de insektmortigilo legomojn, rizojn kaj sakeon (rizvinon), kiujn la urbo atestas kiel „produktaĵojn de cikonia danco”. Tiuj tre bone vendiĝas kaj multaj homoj atendas sian vicon.

HORI Jasuo



Nun pli da idoj naskiĝis kaj la liberigitaj cikonioj vivas sovaĝe.

TRAFIKO

Pli ol aŭto: perspektivo kaj sinteno

Solo, la funkcia prototipo de la unua hungara hibrida aŭto, estis antaŭ nelonge prezentita. Ĝi estas la rezulto de plurjara laboro. La veturil-familio, al kiu aldoniĝos pliaj modeloj en la estonteco, proponas alternativon por kontraŭpezi la dependecon de tradiciaj energifontoj, por mildigi la problemojn de urba trafiko, por redukti la ŝarĝon de natura medio kaj por ŝanĝi la vivmanieron malriĉan je moviĝo.

Nuntempe aŭto por la plimulto estas pli ol nura trafikilo; ĝi estas formo de memesperimo. Aŭto taŭgas ankaŭ por deklari socian statuson kaj rilaton de la posedanto al la komunumo kaj al la naturo. La celo de Solo estas montri en la giganta aŭtomarkato tian vivkoncepton, kiu fokusas al la mondo kreiva, malferma al ŝanĝoj kaj homocentra.

En 2007 vendiĝis 66,5 milionoj da novaj aŭtoj en la monda merkato, kaj tiu nombro kreskas de jaro al jaro. Aŭtoindustriaj gigantoj, pro siaj organiza strukturo kaj grandeco, povas reagi nur malrapide al la akceliĝanta teknika-teknologia evoluo kaj al la sociaj, ekonomiaj kaj teknikaj ŝanĝoj. En la malfermiĝanta interspaco inter solvoj de serioproduktado kaj de novaj teknologioj naskiĝas pli kaj pli da alternativaj aŭtoevoluiĝantaj firmaoj dise en la mondo. Ankaŭ la neprofitcela firmao Antro, fondita en 2001, sekvas tiun vojon. Rezulte de pluraj subvenciitaj projektoj ĵus pretiĝis la unua funkcia prototipo, kiu donas eblon al la renaskiĝo de la karmemora, sed iam granda hungara aŭtoindustrio.

Konstrui tiun ĉi aŭton estis vera defio kaj postulis multe da ofero, sed alportis enorman kvanton da sperto. Tio formas la bazon de pliaj evoluigoj, kies fina celo



En 2007 vendiĝis 66,5 milionoj da novaj aŭtoj en la monda merkato, kaj tiu nombro kreskas de jaro al jaro.

estas krei plenvaloran alternativon al la nuntempaj aŭtoj. La framo kaj karoserio de la tripersona veturilo estas konstruitaj el tre malpeza miksitaj karbonfibro, sed ĝi traĵos signifan „sveltigan terapion” antaŭ la komenco de serioproduktado. La triobla hibrida transmision kreas la plej modernaj litio-jonaj akumulatoroj,



“Solo”: Solo estas la funkcia prototipo de la unua hungara hibrida aŭto.

la multifuella motoro-generatoro, kiu ekfunkcias ĉe pli granda rapideco (tiu ĉi unua prototipo ankoraŭ ne enhavas ĝin) kaj la pedalgatoroj, kiuj ebligas ĉe gimnastikon dum la vojaĝo. La alt-efikaj sunĉeloj sur la tegmento kolektas energion sufiĉan por veturi averaĝe 15-25 km tage je urba rapideco.

Rezulte de la evoluigoj, la karbondioksido-ellaso de Solo estas 2,0-3,3 kg/100 km, kaj ĉio ĉi estas atingebla ĉe per la eventuala uzo de alternativaj energifontoj. Tiu ĉi nombro estas nur kvarono de tiu de la hodiaŭaj plej modernaj aŭtoj. La estontan rapidecon de 140 km/h kaj dinamismon de la veturilo havigas 4 elektraj nabomotoroj. La 3,12 metrojn longa kaj 1,92 metrojn larĝa Solo konsumas nur 1,5-2 litrojn da fuelo en 100 km.

Ĝis la planita enkonduko al la merkato en 2012 la aktuala prototipo bezonas pluajn evoluigojn. Inter tiuj estas la „perdrata” (plene elektronika) regado, enkonstruo de motoro-generatoro kaj adapto de Solo por ebligi la interkonekton de du „Soloj” al unu Duo. La rezulta 6-persona veturilo, kiu havos konsumon de 2-2,5 l/100 km, povos vere konkurenci kun la hodiaŭ tre popularaj familiaj busetoj. Al la merkata enkonduko antaŭtestadoj, preparo de nulserio kaj de serioproduktado, akiro de necesaj permesoj kaj fondado de vendoreto. La ĉefa celgrupo estas individuoj, familioj kaj entreprenoj, kiuj sentas respondecon al la natura medio. Laŭplane la vendoprezo de Solo similos tiun de konkurencaj aŭtoj en la malsupra tavolo de la meza kategorio.

Tamás SLEZÁK

ĈINIO

Evoluanta filmejo Hengdian

Danke al la politiko de reformado kaj pordo-malfermo iama malgranda vilaĝo Hengdian (provinco Zhejiang, orienta Ĉinio) grave evoluis. Unue ĝi prosperis pro sukceso de silka entrepreno, lige kun disponebla magneta materialo kaj kiel loko de elektronika kaj medikamenta industrioj, kaj nun ankaŭ kiel evoluanta filmejo kaj turisma loko.

Lastatempe Hengdian altiris la atenton en Ĉinio lige kun la intenco konstrui modelon de palaco Yuanming-Yuan

– malnova Somera palaco en Pekino, detruita de anglaj kaj francaj trupoj en 1860 – cele al prezento de ĝia pompo.

En 1995 fama ĉina reĝisoro Xie Jin ekplanis produkti filmon „La Opia Milito”. Loĝantoj de Hengdian donis grandan helpon al la reĝisoro, ĉar li havis grandajn malfacilaĵojn en la preparo. Rezulte de la laboroj de hengdiananoj dum malpli ol kvin monatoj ĉi tie aperis modeloj de malnovaj Kantono kaj Honkongo. La filmo havis sukceson kaj iĝis la plej grava en la kariero de reĝisoro



CHEN YINHUA

Situo de Hengdian.

Xie.

Kun granda ĝojo Xie Jin sciigis siajn amikojn: „Estis saĝa decido filmi en Hengdian.” Post li ĉi tie laboris famaj reĝisoroj kaj geaktoroj ĉinaj kaj alilandaj: Zhang Yimou, Chen Kaige, John McTiernan, Kim Heeseon. Tie oni



KANEKEN

Ming-Qing palaco.

produktis ankaŭ aliajn filmojn: „Heroo” de Zhang Yimou, „Promeso” de Chen Kaige, kaj aliaj.

Vidinda loko

Se vi vizitus Hengdian, vi eble trovus tie ion familieran. Kompreneble ĝin vi jam vidis en iu filmo, aŭ vi konas ĝin de historiaj libroj. En tiu montara loko en Orienta Ĉinio vi povas vidi „palacojn” de dinastioj Qin- kaj Ming-Qing, iri laŭ strato de dinastio Song, sperti ankaŭ la

Longan marŝadon de Ruĝa Armeo en 1934-1935. Do, se oni intencas prezenti aferojn historiajn, certe troveblas ĉi tie bonaj lokoj por tio.

En Hengdian nun estas sep grandaj pejzaĝaj zonoj, en kiuj troviĝas 13 filmstudioj. La unua plej granda moderna filmstudio havas areon de 1444 m² kun alteco de 23 m, kaj la dua areon de 1080 m². En 2003 la ĉina registaro decidis konstrui ŝtatan filmindustrian eksperimentan parkon en Hengdian. Tiu spe-

ciala parko estas tre grava por la filmindustrio, ĉar ĝi estas la sola filmejo en Ĉinio kaj la plej granda en Azio. Ĉiam filmproduktaj grupoj laboras ĉi tie pro la belaj pejzaĝoj, modernaj servoj, bonaj kondiĉoj kaj aliaj.

Hengdian estas unu el la turismaj lokoj, kiuj akiris turisman ateston AAAA, kiu estas la plej alta turisma kategorio en Ĉinio. Ĉi tie inter la naturaj belaĵoj menciindas ankaŭ Ping Yan, la unua groto en la suda parto de rivero Yangzi.

CHEN Yinhua



Hengdian estas unu el la turismaj lokoj, kiuj akiris turisman ateston AAAA, kiu estas la plej alta turisma kategorio en Ĉinio.



Litera sudoku

Post unujara interrompo denove reaperas enigma paĝo en **Monato**. La reguloj de ĉi tiu speco de sudoku estas la samaj kiel por la cifera sudoku, nur ke la ciferoj 1 ĝis 9 estas 9 diversaj literoj kaj ke sur la unua horizontala linio griza la litera sinsekvo formas (radik)vorton (aŭ nombron litere skribita).



STEVE RHODES

Sendu la vorton antaŭ la 1a de januaro 2009 al Flandra Esperanto-Ligo, Monato-enigmoj, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete al enigmoj@monato.net.

Inter la solvintoj Monato elektos tri personojn, kiuj ricevos libron kun 80 pliaj diversaj sudokoj!

C					M		L	I
K		T	L		O			E
		E				K		
L	K			C		O		M
		C	N		E	L		
			I				N	O
		I		O			T	
T		M		N			K	

Solvoj de la martaj sudokoj

Sukcesis solvi kaj gajni premion:
Eddy Raats (Belgio), Jean Dietrich (Francio) kaj S. Kitagawa (Japanio).
Korajn gratulojn !

1	^A 7	3	8	5	4	2	6	9
2	5	8	1	9	6	7	3	4
4	6	9	7	3	2	1	8	5
6	4	7	9	^B 2	1	8	5	3
5	8	2	3	4	7	6	9	1
9	3	1	6	8	5	4	2	7
7	9	5	4	6	8	3	^C 1	2
8	2	4	5	1	3	9	7	6
3	1	6	2	7	9	5	4	8

1	^A 9	2	8	4	3	5	6	7
5	8	3	7	6	1	2	9	4
7	6	4	5	9	2	3	1	8
4	7	9	1	^B 5	6	8	3	2
2	3	5	9	8	7	1	4	6
8	1	6	3	2	4	7	5	9
6	5	7	4	3	8	9	^C 2	1
3	2	8	6	1	9	4	7	5
9	4	1	2	7	5	6	8	3

2	9	5	8	7	1	3	6	4
7	^A 6	3	2	4	9	1	5	8
1	8	4	6	3	5	2	7	9
8	5	2	3	9	7	6	4	1
4	3	6	^B 1	8	2	7	9	5
9	7	1	5	6	4	8	3	2
5	1	9	7	2	3	4	^C 8	6
6	4	7	9	1	8	5	2	3
3	2	8	4	5	6	9	1	7

Religio en Japanio. Ĉu budhismo?

Kiam mi vojaĝas en eksterlando, oni ofte demandas min, kiu estas la ĉefa japana religio. Mi respondas, ke tio estas budhismo, ĉar la statistiko diras, ke 80 % de la japanoj kredas ĝin. Tamen, respondante tiamaniere, en mia koro mi ĉiam sentas la demandon, ĉu tiu statistiko estas vera.

En historiaj libroj estas skribite, ke en Japanion venis budhismo en la jaro 538 tra Koreio. Poste Ŝootoku, regent-princo, kaj aliaj iniciatis enkonduki budhismon en Japanion kiel la nacian religion fine de la 6a jarcento, kaj en 604 li proklamis la tiel nomatan Konstitucion de 17 artikoloj, kies 2a artikolo tekstis: „La popolo sincere respektu tri trezorojn: Budhon, la sanktan leĝon kaj bonzojn”. De tiam budhismo fariĝis ŝtata religio, kaj tiamaniere iĝis la ĉefa religio en Japanio.

En la 17a jarcento, en Edo-epoko, la ŝoguno Tokugaŭa Iejasu leĝigis la tiel nomatan Leĝon pri Temploj kaj metis la templojn sub sia regado (1615), ĉar ofte kongregacioj estis gravaj minacoj por la regantoj, kontraŭbatalante la registaron. En 1613 la registaro malpermesis kristanisman en Japanio, kaj por plenumi tion perfekte, ĝi ordonis, ke ĉiuj loĝantoj apartenu al iu templo kaj estu registritaj en tiutempla Registro pri Kredantoj, same kiel nun ĉiuj homoj estas registritaj kiel civitanoj en iu vilaĝo aŭ urbo. En tiu sistemo la popolanoj komencis havi siafamilian tombon en „sia” templo kaj sezone viziti tiun aŭ inviti bonzon al sia hejmo por la ceremonio.

Post la japana modernigo en 1868, la nova registaro permesis kristanisman, sed tiu ne multe disvastiĝis kaj eĉ nun la proporcio de kristanoj estas nur 1% de la tuta loĝantaro. Ankaŭ multaj novaj reli-

gioj kiel Oomoto naskiĝis, sed ankoraŭ budhismo estas la plej potenca religio en Japanio.

Mi neniam estis enketita pri mia religio, sed certe mi estas klasifikita kiel budhisto, ĉar mia familio petis de iu templo la servon okaze de la morto de mia patro. Kiam venas enketo al tiu templo pri la nombro de kredantoj fare de ministrejo aŭ de la centra oficejo de tiu budhisma sekto, tiu certe enkalkulas mian familion kiel sian kredantan familion. Tiamaniere la sumo de „budhistoj” atingas 80 % de la japanoj. La sama afero okazas pri ŝintoismo, japana pra-religio. Laŭ statistiko 80 % de la japanoj apartenas ankaŭ al ŝintoismo. En preskaŭ ĉiuj distriktoj ekzistas ŝintoisma templo, kaj tiu enkalkulas la loĝantojn kiel siajn kredantojn. Tiamaniere, strange, multaj japanoj estas samtempe kredantoj de budhismo kaj de ŝintoismo. Ĉu tio ne signifas, ke tiaj homoj estas nenies kredantoj?

Ĝenerala la nocio de kredanto de iu religio estas „homo, kiu ofte vizitas la templon, preĝejon aŭ sanktejon, legas sutron kaj kondukas laŭ la edifo de tiu religio”. Kion mi faras kiel „kredanto”? Mi (mia familio) ja vizitas la templon, al kiu mia familio apartenas, kaj invitas bonzon, sed nur okaze de funebro kaj festivaloj de mortintaj familianoj laŭ kutimo. Kaj provizore kaj imitante, mi voĉlegas sutron tute ne kompreneblan. Tamen aliokaze mi neniam vizitas templon, mi neniam legas sutron, mi neniam kondukas laŭ la edifo de budhismo,

kvankam mi eble agas budhiste, sek-vante kutimon kaj moron de nia socio multe influita de budhismo. Mi ne estas escepto. Legu la suban statistikon.

Laŭ enketo fare de ĵurnalo Asahi (2008 08 02), vizitas siafamilian tombon

- 3 %: kelkajn fojojn monate
- 58 %: kelkajn fojojn jare
- 18 %: unu fojon dum kelkaj jaroj
- 15 %: preskaŭ neniam
- 6 %: aliaj respondoj.

Antaŭe viziti tombon signifis viziti templon, kie estas familia tombo, sed nuntempe viziti tombon ofte ne havas rilaton al templo, krom speciala okazo, ĉar multaj ne havas sian tombon en templo sed en granda publika tombejo.

Laŭ statistiko en Japanio estas 86.000 temploj kaj 91 milionoj da kredantoj el 127 milionoj da loĝantoj, tamen pro ne-religia etoso de multaj japanoj nun ĉiuj temploj suferas pro financa malfacilo. Malmultiĝas familioj en provincaj urboj kaj vilaĝoj. Junaj generaciuloj forlasis sian hejmon en provinco, kie ofte solaj plu loĝas iliaj gepatroj, gardante sian tombon, sed post iliaj mortoj, neniu zorgos pri ilia tombo. Tio signifas, ke la templo perdas sian klienton. En grandaj urboj junaj generaciuloj ne havas interenson pri religio.

Laŭ la specoj de enspezo oni povas klasifiki templojn en tri grupojn:

1. temploj, kiuj dependas de mondonaco de siaj kredantoj, farante budhismajn servojn.
2. temploj, kiuj dependas de turis la



Familiaj tomboj.



49 tagoj post morto de familiano.

toj, kiuj pagas por la artaĵoj hereditaj en tiuj.

3. temploj, kiuj dependas de honorario por preĝoj kiel ekzemple preĝoj por trafika sekureco al aŭtomobilo.

Pli ol 90 % de la temploj apartenas al la unua grupo. Se templo ne havas pli ol 300 familiojn kiel sian kredantaron, estas malfacile administri la templon, sed lastatempe oni ne volas havi grand-skalan funebron. Iuj familioj eĉ ne havas funebron kaj transportas la cindron al sia tombo sen la servo de bonzo. Kiam homo mortas, li/ŝi ricevas postmortan nomon konsistantan el kelkaj ĉinaj ideogramoj; tamen tio kostas multe. Por mia forpasinta patro mi pagis 300 mil enojn (20 mil eŭrojn) laŭ la konsilo de la templo, ke tiu sumo estas averaĝa. Ne malmultaj fami-

lioj opinias, ke estas senutile pagi tiom multe da mono al mortinto. Oni preferus uzi ĝin por vivantaj familioj.

Tiamaniere la administrado de temploj iĝas pli kaj pli malfacila. Iu granda kongregacio, kiu konsistas el 10 milionoj da kredantoj, havas pli ol mil senbonzajn templojn administratajn de helpantaj bonzoj el alia templo kaj 150 nefunkciajn templojn eĉ sen helpantoj. Por bonigi la situacion, iuj temploj komencis busservon por kredantoj, ĉar multaj estas tiel maljunaj, ke estas malfacile piede viziti la templon. Iuj malfermis maljunulejon aŭ infanejon en sia tereno por havi pli da kontakto kun la lokanoj. Iuj luis lokalon en Tokio kaj havas kontrakton kun funebra kompanio pri la servo.

Japana budhismo jam de antaŭ longe estas mokata kiel „porfunebra budhismo”, ĉar homoj vizitas templon nur okaze de funebro kaj temploj ne havas influon kiel religio al la loĝantoj, sed nun tiu „porfunebra budhismo” estas velkanta eĉ en la epoko de multaj funebroj en maljuna Japanio.

Mi revenas al mia unua demando: Ĉu budhismo estas la ĉefa japana religio? Ĉu vere 80 % de la japanoj kredas budhismon? Mia konkludo estas, ke statistike la japana ĉefa religio estas budhismo, sed en efektiveco nur malmultaj kredas budhismon, kaj oni uzas/utiligas budhismon ne kiel religion sed kiel unu sistemon por glatigi la vivon.

HORI JASUO

TURISMO

Viziti mikroŝtatojn



Mikroŝtato Barbado ankaŭ ne sukcesis eviti la amasturisman viruson, sed ĝi ankoraŭ havas multajn nature aŭtentajn regionojn.

Loĝantoj de Irlando spertis en mallonga periodo nekredeblajn ekonomiajn ŝanĝojn. Antaŭ nur du aŭ tri jardekoj malmultaj irlandanoj estis sufiĉe bonstataj por povi ferii eksterlande. Sed nun la vivo de multaj el ili pliboniĝis danke al la tiel nomata „Kelta tigo”, la prospera konjunkturo, kiu sekvis la aliĝon de Irlando al la Eŭropa Komunumo (hodiaŭ Eŭropa Unio). Kvankam ankoraŭ troviĝas en la lando malriĉuloj, kiuj neniel profitis la „tigran” ekonomion, tamen granda nombro da homoj dronas en nova riĉeco. Kelkaj ĝuas ne nur po unu eksterlandan feriadon ĉiujare, sed tri aŭ kvar: ekzemple semajnon aŭ du semajnojn printempe en Portugalio, someran krozadon ĉirkaŭ la Antiloj, aŭtunan restadon en Hispanio kaj vintran skiadon en Svislando aŭ Aŭstrio. Multegaj irlandanoj aĉetas domojn kiel investaĵon aŭ konstantan feriejon en landoj kiel Bulgario, Turkio

aŭ Francio.

Kompreneble la irlandanoj ne estas la solaj, kiuj invadas la popularajn feriejojn de Eŭropo kaj pli foraj landoj kiel Tajlando, Peruo ktp. Malfeliĉe, transloĝiĝinte al tiuj lokoj, ili per sia ĉeesto plejofte detruas la allogaĵojn, kiuj komence altiris ilin. Lokaj kutimoj kaj



Laŭlonge de belaj plaĝoj estas konstruataj sennombraj hidaj strioj da multetaĝaj hoteloj, apartamentoj kaj vilaoj, okupataj de eksterlandanoj.

vidindaĵoj malaperas. Laŭlonge de belaj plaĝoj estas konstruataj sennombraj hidaj strioj da multetaĝaj hoteloj, apartamentoj kaj vilaoj, okupataj de eksterlandanoj. Sekve, en kelkaj regionoj de Hispanio kaj Portugalio apenaŭ aŭdiĝas la respektiva nacia lingvo aŭ ne troviĝas lokanoj. Oni havas la impreson, ke tiuj regionoj estas kolonioj de iu nova speco de imperiistoj.

Pro tio mi revas pri alia speco de turismo. Se mi estus pli juna, pli riĉa kaj malpli pigra, mi dezirus viziti ne kune kun milionoj da filistroj tiujn nerebonigeble difektitajn regionojn, kiuj iam estis belaj, nature aŭtentaj kaj posedis riĉan kulturon, sed kelkajn el la „mikroŝtatoj” de la mondo. Per tiu termino mi celas la sepdekda ŝtatojn, kies areo estas malpli ol milo da kvadrataj kilometroj. Fakte, kelkaj el ili estas tiom etaj, ke ili aspektas kiel nuraj poŝtukoj sur la mapo de mondo. Mi scias, ke malmultaj el tiuj

mikroŝtatoj sukcesis eviti la amasturisman viruson, sed ankoraŭ restas sufiĉe da motivoj por ekkoni ilin.

Jen mia listo da mikroŝtatoj (ordigita de la plej malgranda ĝis la plej granda kaj kun indiko de la areo en kvadrataj kilometroj) el kiuj la plimulto estas ĉarmaj kaj vizitindaj:

ŝtato	areo
1. Vatikano	0,44
2. Monako	1,60
3. Nauro	21
4. Tuvalo	24,6
5. San-Marino	61
6. Liĥtenŝtejno	160
7. Sent-Kristofo kaj Neviso	262
8. Malto	316
9. Barbado	430
10. Antigvo-Barbudo	442
11. Andoro	465
12. Singapuro	616
13. Sent-Lucio	616
14. Barejno	661
15. Tongo	691
16. Kiribato	717
17. Sao-Tomeo (kaj Principeo)	964



Liĥtenŝtejno estas tre bela mikroŝtato por unutaga vizito.



San-Marino: ekskursantoj kutime pasigas ĉi tie nur kelkajn horojn, kaj poste foriras sen postlasi gravan influon al la kulturo kaj socio de la landeto.

En mia hipoteza itinero mi eble ne inkluzivus Barejnon aŭ Nauron. Mi havas neniun objekton kontraŭ ambaŭ ŝtatoj, kies loĝantoj certe estas afablaj kaj gastamaj. La unuan mi ellasus, ĉar mi sentas min malkomforta en varmegaj, sekaj, sablaj dezertaj landoj. La duan ankaŭ, ĉar la edzo de amikino de mia edzino antaŭe laboris sur insulo Nauro (tiam nomata Ocean-insulo), kaj priskribis malallogan bildon pri ĝi. Ekde jaroj la britoj tie produktas fosfaton, kiu abundis

sur Nauro kaj nun preskaŭ elĉerpiĝis. La amiko diris, ke la ekspluatado tute detruis la medion, socion kaj etoson de la insulo. Do, ni donu prioritaton al la ceteraj landetoj sur la ĉi-supra listo.

Ni prenu ekzemple Vatikanon, San-Marinon, Liĥtenŝtejnnon. Estas vero, ke ĉiujare milionoj da turistoj vizitas ilin. Sed, male al la situacio en Andaluzio (Hispanio) kaj Algarvo (Portugalio), kiuj nun havas grandegajn konstantajn aŭ provizorajn eksterlandajn loĝantojn kaj



feriantojn, la menciitaj tri mikroŝtatoj estas celo de efemeraj ekskursantoj, kiuj kutime pasigas tie nur kelkajn horojn, kaj poste foriras sen postlasi gravan influon al la kulturo kaj socio de tiuj landetoj.

Do, kiam mi feris en Romo, mi havis okazon viziti Vatikanon kaj eĉ vidi la papon. Feriante en la regiono de Bregenco en Aŭstrio, mia edzino kaj mi iufoje faris unutagan ekskurson per aŭtobuso al Vaduzo. Ni ne pasigis eĉ unu nokton en Liĥtenŝtejno, sed revenis al nia hoteleto en Aŭstrio. Kompreneble, tiuj ŝtatoj estas tiom malgrandaj, ke kelkaj horoj sufiĉas por vidi ĉiujn tieajn vidindaĵojn.

Simile, se oni ferias en Rimini, aŭ en iu ajn parto de Italio, oni facile povas fari tuttagan ekskurson al San Marino. Al Andoro oni povas vojaĝi de suda Francio aŭ de norda Hispanio. La menciitaj insuloj krom Malto, kiu estas facile atingebla, prezentas pli grandan defion, ĉar kelkaj situas tre malproksime de la landoj, en kiuj kredeble loĝas la plimulto de la legantoj de MONATO, kaj ekster normalaj turismaj trafikvojoj. Tio, tamen, certe pliigos la senton de aventuremo kaj proponos malkutimajn feriojn al plej ambiciaj turistoj.

Mi konfesu, ke ĝis nun mi sukcesis viziti malmultajn el tiuj mikroŝtatoj, sed mi tre ĝuis la limigitan sperton, kiun mi havis en ili. Pri la aliaj ... oni vivas kaj esperas, ke la okazo prezentos sin.

Garvan MAKAJ



Se oni ferias en Rimini, aŭ en iu ajn parto de Italio, oni facile povas fari tuttagan ekskurson al San Marino.

Teologia utopio

Claude Piron estis persono, havanta multegajn meritojn antaŭ nia movado – sciencisto, publicisto, propagandisto, stilisto, eĉ bardo-kantisto, sed, sendube, en la memoro de novaj generacioj de esperantistoj li restos unuavice elstara verkisto (eĉ kelkaj verkistoj, se konsideri publikigon de pluraj liaj libroj sub pseŭdonimoj!). Kaj jen antaŭ ni estas lia lasta libro, aperinta ĵus antaŭ lia morto. Romano-dialogo, eldonita sub lia propra nomo, kaj tute ne simila enhance kaj etose al ĉio, kion li verkis pli frue. Malgraŭ spuroj de la kutima ironio de la aŭtoro, ĝi estas esence serioza, ĉar temas pri ebleco de la eterna postmorta vivo, ebleco de religia kredo kaj simile.

Tian temon verkisto povas elekti iam ajn, ĉar meditoj de la homo pri eterneco, postmorta ekzisto kaj koncernaj demandoj estas oftaj en filozofiema beletro. Sed la fakto, ke la libro estas la lasta de la aŭtoro, kaj, sekve, Claude Piron enpensiĝis pri la aferoj nelonge antaŭ la forpaso, signifas, ke ĝi estas siaspeca spirita testamento de la homo, kiu antaŭsentis la proksiman morton kaj decidis dividi siajn meditojn kun vasta publiko. Mi aparte bone komprenis tion, kiam mi finlegis la libron en hospitalo, kien mi trafis pro grava kormalsano.

La formo de la libro estas dialogo inter psikoterapiisto kaj lia iama paciento. La paciento fariĝis jam normala, sed sonĝe travivis ian revelacion kaj mistikan sperton, kaj la psikoterapiisto petis lin rakonti pri tiu sperto por kompreni ĝin el la vidpunkto de lia scienco. Danka al li pro kuracado, la ekspaciento konsentis. Do, ili konversacias: ekspaciento-mistikulo kaj kuracisto-raciistomateriisto (kiun la paciento familiare nomas psiĉjo). La kuracisto penas kompreni la esencon de la mistikismo de la paciento, kaj la paciento – komprenigi al li la nekompreneblan por materiisto mondkoncepton. Certe, ili ne povas kon-

vinki unu la alian, kaj la aŭtoro ne emas fari iun finan konkludon, proponatan por la leganto – li montras du mondkonceptojn, inter kiuj li ne povas elekti mem.

Sciante, ke psikologio kaj psikoterapio estis la fako de Claude Piron, ni povas supozi, ke la psikoterapiisto estas alter ego de la aŭtoro. Sed, konsiderante ke li mem meditas pri la aferoj, oni povas supozi, ke ankaŭ la paciento reprezentas la alian flankon de li mem. Do, verŝajne, la konversacio estas iom leĝere prezentata interna dialogo de la aŭtoro, kiu, kiel reprezentanto de sia materiisma profesio, diskutas kun tiu sia parto, kiu timas la morton kaj sopiras je senmorteco, postmorta ekzisto (al tiu sopiro, verŝajne, kontribuas infanaĝa katolika edukado). Do, ekstaras la demando: ĉu la Dio ekzistas kaj kia estas? Tradicia teologia demando, kaj en la libro estas priskribata originala versio de teologio.

La aŭtoro, kiel homo racie pensanta, ne povas kontentiĝi pri la bildo de transmondo kaj imago pri Dio, kiujn prezentas la tradiciaj religioj – Dio ja ne povas esti tiu severa policano (aŭ patriarkeca familia patro), kaj la transmondo ne povas esti tiu kombino de primitivaj ĝuejo kaj turmentejo (paradizo kaj infero), kien la homo trafas pro dumvivaj (mal)meritoj. Do, la tradiciaj religioj estas forbalaataj. Ankaŭ Dio de filozofoj – abstrakta racio, kreinta la mondon – ne estas akceptebla, ĉar ne bezonata. Dio, kiu kontentigus la aŭtoron, kaj kiun prezentas la paciento, ne estas iu Dio, skribenda kun majusklo, sed ties (kaj ĉies) amiko, kamarado, kiu estas nek li, nek ŝi, nek ankaŭ ĝi, sed estaĵo, kiu postulas plej simplan rilaton kaj specialan pronomon di (kun minusklo). Di estas absolute bona kaj bonvolema, absolute amanta ĉiujn, neniam punanta iun pro io, malgraŭ tio, ke di estas fakte ĉionscia kaj ĉionpova. Por din kompreni kaj per-



cepti ĝuste, necesas nur senigi sin de ĉio malbona kaj malica, kio estas interne. Di kapablas enmiksiĝi en la homan vivon, sed ja pleje estimas la liberon de ĉiu individuo, tial ne enmiksiĝas kaj nenion korektas por ne rompi tiun liberon – do diversaj fiaĵoj aperas. Rekompence, transmonde estas nura libero kaj feliĉo. Rezulte, se ni konsideros la tradiciajn „realajn” teologiojn neakcepteblaj, tiu teologio, kiu estas priskribata en la libro, estas siaspeca „teologia utopio”, kaj ĝi estas la ĉefa esenco de la lasta verko de Claude Piron. De la alia flanko, realeco de tiu utopio restas nur supozo, ĉar por psiĉjo ĉiuj vizioj de lia ekspaciento plu restas nur halucinoj.

(Parenteze mi volus emfazi, ke la aŭtoro konsideras akceptebla nur la veran transmondan eternan ekziston, kie, malgraŭ kunfandiĝo kun di, individuo konservas sian personecon kaj memoron. Neniaj filozofiaj surogatoj, kiel plua postmorta ekzisto de nemateria animo, kiu ne memoras pri sia antaŭa enkorpita vivo, lin kontentigas – ja ne estas senmorteco post malapero de personeco!)

Malgraŭ granda, plurfoje pruvita literatura majstreco de la aŭtoro, tiu ĉi verko ne rezultis, laŭ mi, plene sukcesa.

DIO

La sentenco, ke Dio estas amo ja en la kristanismo ekzistas, kaj imago pri libera volo de la homo – same (krom en kalvinismo). Samtempe, la plej stumbla problemo por iu ajn religio – teodiceo – restas tute ne solvita, kaj sen solvo de ĝi nenia utopio sur teologia bazo aspektas alloga.

Ja en la dialogo inter materiisto kaj mistikulo ambaŭ flankoj devus esti same konvinkaj kaj interesaj, eĉ en la situacio, kiam unu el la partneroj devas precipe nur aŭskulti kaj la alia rakonti. La pozicio de psiĉjo, kiu devus riviĝi en la demandoj kaj replikoj, ne sufiĉe reliefigas – li ŝajnas sufiĉe pala. Ankaŭ la multe pli suke karakterizata paciento estas ne plene realece prezentata – post siaj revelacioj li nepre devus esti iom alikondata. Kaj konstantaj ripetoj de la samaj tezoj, eĉ se esprimataj el iom malsamaj vidpunktoj, trolongigas kaj iom enuigas la tekston.

Ankaŭ en la utopia teologio, kiu estas prezentata kiel sola akceptebla, kaj kiu estas kontraŭstarigata al ĉiuj tiuj, kiujn enhavas la tradiciaj religioj, restas pluraj mallogikaĵoj, neresponditaj de-

mandoj kaj spuroj de ĝuste tiuj religiaj imagoj, kiuj estas neataj. La sentenco, ke Dio estas amo ja en la kristanismo ekzistas, kaj imago pri libera volo de la homo – same (krom en kalvinismo). Samtempe, la plej stumbla problemo por iu ajn religio – teodiceo – restas tute ne solvita, kaj sen solvo de ĝi nenia utopio sur teologia bazo aspektas alloga. Finfine, kontraŭdiras al logikeco de ĉiuj teologiaj konstruoj la ĉefa punkto en la intrigo – pro kiaj meritoj ĝuste tiu homo, neniel elstara, ricevis la honoron dumvive kontakti tiun transmondon, kiun ĉiuj ceteraj rajtas trafi nur postmorte? Laŭ mi, ĝuste tio estas pruvo de la opinio de psiĉjo, ke ĉiuj „songaj vojaĝoj” al la transmondo kaj kontaktoj kun di estas nur halucinoj.

Ĉiukaze, la libro, prezentanta

antaŭmortajn meditojn de elstara homo, des pli eminenta psikologo, pri la vivo kaj morto ne povas ne esti interesa. Eble, ili helpas al aliaj homoj trovi novajn argumentojn, kiuj konvinkos iujn pri ekzisto, aliajn – pri malekzisto de di kaj transmondo – ĉiu elektu laŭ sia inklinilo. Ja tio, evidente, estis la celo de la aŭtoro, kiu sukcesis prezenti al ni sian lastan donacon. Pri kio, tamen, tute ne estas duboj, estas tio, ke Claude Piron restos longe viva – se ne en transmondo, do nepre en nia danka memoro.

Nikolao GUDSKOV

Claude Piron: *Dio, psiĉjo kaj mi*. Eld. IEM, Vieno, 2007. 173 paĝoj, broŝuritaj. ISBN 978-3-01-000036-9.

Prezo ĉe FEL: 16,50 eŭroj + afranko.

Japanio tra homoj

Post longa periodo, kiam historion oni ligis precipe kun regantoj, militoj kaj bataloj, aperis kaj ekfloris fako, celanta kapti diversajn momentojn de ĉiutaga vivo de homoj kaj popoloj. Sciencistoj interesiĝas nun pri tio, kion oni manĝis en diversaj epokoj, kiujn vestojn surportis, per kiuj kantoj lulis bebojn, kiel kuracis malsanojn. Rusa eldonejo, kiu famas pri sia libraro pri vivo de elstaraj homoj, aperigadas jam kelkajn jarojn la ruslingvan serion *La ĉiutaga vivo de la homaro*. Iuj libroj en ĝi estas pli sciencaj, aliaj malpli, sed ĉiu malkovras iujn novajn homecajn trajtojn de iu popolo aŭ epoko.

La libro *Rememoroj pri tempo de silko kaj pajlo. Portreto de japana urbeto de Ĵuniĉi* Saga povus eniri en similan serion. Ĝi prezentas Japanion de la komenco de la 20a jarcento. Tamen la verko ne estas aŭtora priskribo, en ĝia kreado partoprenis pli ol 60 homoj, rakontintaj pri sia vivo en juneco kaj pri tio, kion ili aŭdis de siaj gepatroj kaj geavoj. La libro estas iusence komunaj memoraĵoj.

Pri tio, kiamaniere la libro aperis, la leganto ekscias de la aŭtoro mem. Lia 60-jara patro komencis pentri por konservi sian urbeton Tsuĉiura, kia li konis ĝin. Kaj por aldoni al tiuj pentraĵoj vortojn, la aŭtoro decidis kolekti rakontojn de loĝantoj de la urbeto kaj ĝia ĉirkaŭaĵo pri la antaŭa vivo. Estante kuracisto, post la laboro li vizitis maljunulojn kaj registris iliajn memoraĵojn. Interalie, la libro efektive havas ene kortuŝajn bildojn de Susumu Saga, ne nur nigrablankajn, sed ankaŭ multkolorajn.

Jam nura rigardo al la sekci-titoloj instigas tuj legi la libron:

*En urbo,
Fiŝkaptistoj kaj pramistoj,
Butikistoj kaj komercistoj,
Urbaj virinoj,
Gejŝoj kaj oficiroj,
Metiistoj kaj aliaj spertuloj,
Pri lernejo kaj ludoj,
Kampara vivo,
Kamparaj virinoj.*

Ĉiu sekcio enhavas meznombro sep mallongajn, kelkpaĝajn rakontojn. Tiu mallongeco faras la libron tre vigle legebla! Ĉe ĉiu historieto estas indikitaj la nomo kaj vivdatoj de la homo, ĝin rakontinta. Verŝajne la plimulto de la legantoj estos konfrontita al la sama problemo, kiel ni: ne eblas antaŭ la legado laŭ la nomo identigi la sekson de la rakontanto, do necesas serĉi menciojn en la teksto. Ĉiu rakonteto havas sian propran interesigan titolon (ekzemple, „Lasta ekzekutisto”, „Unutaga gasto”, „Aĉetumado”).

Oni povas tuj trovi klarigojn pri la plej gravaj aĵoj, eventoj kaj dioj en la fino de la libro. Krom tiu referenca sekcio, zorgo pri la leganto montriĝas en tio, ke ĉie, kie temas pri longo, larĝo, pezo, areo ktp, apud valoroj en japanaj unuoj estas indikitaj ankaŭ valoroj en pli kutimaj metroj, kilogramoj ktp.

Kiel vi jam vidis, la temoj de la rakontoj estas tre diversaj. Ni certas, ke iujn nekonatajn detalojn pri la antaŭa vivo trovos eĉ japanoj, kaj alilandanoj nepre! Por ni nova estis preskaŭ ĉio, malgraŭ tio, ke ni ja sciis, kio estas toŭfuo, misoo, getaoj kaj jakuza.

En rakontetoj oni trovas kaj detalajn priskribojn de iuj ĝeneralaj aferoj, kaj etajn momentojn de la vivo de apartaj homoj. Sur ĉiu paĝo estas io surpriza. Kial *hanten*, vesto kun la signo de granda vendejo, estis la plej valora garantiaĵo por uzuristo? Kiel oni aranĝis la laboron de vendejo de ĉeval-viando? Kial kaj kiel oni banis sin en grandaj kuvoj apud lago de aprilo ĝis novembro? Ĉu en vendejo de brokantaĵoj kaj antikvaĵoj oni povis aĉeti samurajajn valoraĵojn? Kiel oni bakis la krakenojn *senbei*? Kiel dependis virina hararanĝo de ŝia aĝo kaj familistato? Kiel oni tegolis kaj faris pajlan tegmenton? Kia akvotemperaturo estas la plej dezirata por kaptado de skombroj? Viroj de kiu profesio estis plej imponaj por virinoj? Kiel laboris tinkturisto? Kiel amuziĝis knaboj? Kial knabinoj por prepari sian doton devis

scipovi kulturi silkraŭpojn? Kion diras la koloro de la fumo al produktisto de lignokarbo? Kiel oni pakis ovojn por transportado? Abundo da diversaj faktoj kaj faktetoj! La leganto ankaŭ kaptos amuzajn proverbojn (ekzemple, „Bovino trinkas, kaj ĉevalo manĝas”), historiojn (ekzemple, legendon pri Ĉegolfa Taro) kaj kalkulversetojn.

La libro estas traduko de la japanlingva verko Tsuĉiura-no sato (kun aldonitaj rakontoj el aliaj verkoj de la sama aŭtoro), tamen farita surbaze de la angla versio de la libro. (Interalie, la anglan influon oni rimarkas en la uzado de punktoj anstataŭ decimalaj komoj kaj en interpozicio de citiloj kaj komoj.) Tradukis Judyta Szczerbicka-Yamato. Koran dankon al ŝi pro esperantigo de tiom interesa legaĵo! Sed, bedaŭrinde, estas kelkaj aĵoj, kiuj iom damaĝis la tradukon. Ili ripetigis, kaj la leganto povas rapide alkutimiĝi, sed restas iom ĝenata. Temas pri fojfoja manko de subjekto en frazoj, forgeso de akuzativo ĉe participoj kaj stranga interpunkcio. Iom ĝenas la uzado de „ludi” anstataŭ „amuziĝi”, sen-spaceta „kunekun” kaj eraroj (neoftaj) pri superflua „-ig-” ĉe verboj. Aparta problemo por ĉiu traduko estas transdonado de naciaj familinomoj kaj aliaj neesperantigitaj vortoj. Bedaŭrinde, ne ĉie la tradukisto agis unuece. Ie estas skribita „-aŭa”, sed alie „-awa”, ie oni uzas „y” apud esperantaj supersignitaj literoj. Ni trovis ankaŭ kelkajn tajperarojn, sed vere ili maloftas. La interesa enhavo kaj facila legado forgesigas pri ĉio ĉi.

Do, ni varmege rekomendas tiun ĉi libron al ĉiu, kiun interesas ĉiutaga vivo kaj kutimoj. Eĉ komencantoj povas facile legi tiujn ĉarmajn rakontetojn!

Anna kaj Mati PENTUS

Ĵuniĉi Saga: *Rememoroj pri tempo de silko kaj pajlo. Portreto de japana urbeto*. Tr. Judyta Szczerbicka-Yamato. Ilustraĵoj de Susumu Saga. Eld. Ad Rem, Jelenia Góra, 2006. 265 paĝoj gluitaj. ISBN 83-89863-46-4.

Prezo ĉe FEL: 25,99 eŭroj + afranko.

Kiel raporti pri Afriko

Ĉu vi estas juna ĵurnalisto, aspiranta esti fama kaj sukcesa? Vi eble devas studi la labormanierojn de ĵurnalistoj, kiuj jam atingis tion dum multjaraj laboroj por okcidentaj informagentejoj kaj televidejoj kiel BBC, CNN, AP, Reuters ktp. Mi fojfoje legis kaj spektis iliajn raportojn kaj nun scias, kiel batas iliaj koroj, kiam ili raportadas pri Afriko.

Eble nenia laboro estas pli simpla ol raporti pri Afriko! Fakte ĉion vi povas fari sen vizito al la kontinento. Vi povas akiri helpon sekvante la paŝojn de la raportistoj de la menciitaj organizaĵoj, kiuj jam kreis certajn neforigeblajn impresojn en la koroj de ne-afrikanoj. Tamen, raporti pri Afriko estas ankaŭ granda defio: vi devas havi la kapablon silentigi la voĉon de via konscienco. Se vi ne povas fari tion, vi ne sukcesos. Silentigi vian konsciencon ankaŭ helpas al vi la imago, ke la afrikanoj ne havas emociojn. Libere per via plumo trafu iliajn korojn, ĉar ili sentas tute nenion.

Gravas bildoj

Nun, por ŝajnigi veron, en ĵurnalismo oni multe uzas bildojn. Fakte oni kredas, ke unu bildo valoras pli ol mil vortoj. Moderna teknologio helpas nin manipuli bildojn. Do unu bildo jam kapablas mensogi pli ol mil vortoj. Do fotu nur en vilaĝoj kaj malbelaj partoj de urboj. Amasigu geknabojn senvestajn kaj virinojn kun velkaj nudaj mamoj por fotado. Tio estas la vera vizaĝo de Afriko. Ankaŭ ĉiu virino devas porti ion grandan sur sia senhara kapo kaj bebon dorse. Memoru, ke nur Afriko havas kurbajn aĉajn vojojn. Alilokaj vojoj estas oraj. Se vi skribas pri Afriko ĉe via skribtablo el via distanca lando, AP, Reuters, BBC ktp. povas malavare havigi al vi bildojn el siaj eternaj arkivoj.

Multe parolu en via raporto, ke estas ĉiam varmege kaj humide en Afriko.

Tamen se vi raportas dum malvarma sezono, evitu mencion pri tio. Lerne ĝeneraligi preskaŭ ĉion. Ekzemple, se vi vizitas vilaĝeton, kie iu homo manĝas moskitojn, vi povas uzi la titolon „Afrikanoj manĝas moskitojn”. Memoru, ke Afriko estas unu granda vilaĝo, kie oni parolas saman lingvon, kaj ĉio „estas” sama! Se temas pri homoj, kiujn policanoj kaptis, dum ili kontraŭleĝe provis eniri Eŭropon, raportu en maniero kiu lasos viajn legontojn konkludi, ke neniu afrikano havas vizon. Memoru, ke afrikanoj volas vojaĝi alilanden nur pro malsato kaj bataloj.

Nudeco tie kaj aliloke

Vi bezonas multajn bildojn aĉajn; se vi volas raporti pri Afriko: Nudaj homoj (memoru, ke nudeco priskribas primitivecon, se temas pri Afriko, se temas pri aliaj lokoj, nudeco montras modernecon); kurbaj tru-plenaj vojoj; viroj kun dekoj da edzinoj; familioj kun dekoj da infanoj, kiuj per fingroj manĝas el sama ujo. Notu ke, se via bildo ne havas arbojn aŭ bestojn ĉe la fono, oni eble ne kredos ke ĝi estas vere el Afriko. Ne diru, ke en tuta Afriko oni batalas, sed per via artista lerteco lasu la legontojn mem konkludi, ke en la tuta kontinento oni eterne batalas. La bataloj laŭ via skribo povus esti pri iu puto senakva aŭ io ajn laŭ via imago. Memoru, ke ĉia imago pri Afriko estas vero en la koroj de ne-afrikaj legantoj.

Dezerto kaj ĝangalo

Estu subtila, kiam vi skribas pri Afriko: Ekzemple, sciu kiel priskribi Afrikon kiel kompletan dezerton, kiam vi raportas pri terglobo varmiĝo, senarbigado kaj manko de manĝo; kaj priskribu la kontinenton kiel kompletan ĝangalon, se via raporto temas pri primitiveco. Uzu la raporton pri abundo de sovaĝaj

bestoj eĉ sur la stratoj, por ŝajnigi, ke Afriko estas sovaĝa kontinento, aŭ pri la preskaŭa formorto de ĉia besto, por ŝajnigi ke en Afriko mankas ĉio. Multe menci, kiam la koncernata afrika lando gajnis sendependecon de sia okcidenta kolonia mastro. Tio povas helpi vin krei en la koroj de viaj legontoj la ideon, ke tiu lando ekhavis problemojn sociajn, post kiam ĝi ekhavis lokajn estrojn. Skribu pri la milionoj da dolaroj, kiujn okcidentaj registaroj jam sendis por helpi, sed kies efikojn oni ne vidas pro oficiala korupteco en la kontinento. Parolu nur pri malsano, malsato kaj bataloj, ĉar aliookaze oni ne legos viajn raportojn.


Laŭeble bizara

Libere skribu ion ajn. Se temas pri Afriko, neniu plendos kaj estos nenia proceso kontraŭ vi. Reuters, AP, CNN, BBC kaj aliaj similaj jam liveras bizarrajn raportojn, kaj oni povas facile konjekti, ke post kelkaj jaroj troviĝos pli da bizaraj raportoj, ĉar homoj preferas (aŭ ĝojas) legi bizarrajn raportojn, se temas pri aliaj homoj. Pri tio kulpas ni ĉiuj! Kulpas niaj nigraj koroj! Kulpas la diablo en ni ĉiuj!

Antaŭ ol fini tiun ĉi artikolon, mi devas menci ion gravan: pro iu neklara kialo oni evitas rekte menci, ke afrikanoj kulpas pro naturkatastrofoj kiel longa manko de pluvado kaj pro diluvo. Do skribu pri tio en maniero, kiu lasos la legontojn kredi, ke afrikanoj aŭ Dio aŭ ambaŭ kulpas! Memoru, ke en aliaj kontinentoj la homoj estas tiel lertaj, ke ili majstras Dion kaj naturon.

Nu, mi pensas, ke vi jam havas sufiĉe da informoj kiel skribi raporton pri Afriko. Se vi povus lerte sekvi mian priskribon, jam en mallonga tempo via plumo, same kiel tiu de aliaj pri-afrikaj raportistoj, estus pli sovaĝa (kaj via koro pli malluma) ol la kontinento Afriko.

Gabriel Olúbúnmi Ōshó-Davies



anoncetoj

Vizitu IperNity, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 1250 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.ipernity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpage prov-ekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de la verkoj de Jorge Camacho aŭ de Sikosek? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo*? Ĉio tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0259-6587

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

PETU PROVNUMERON ĈE
LA GAZETO – 55210 CREUE (Francio)

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel
Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet,
Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier,
Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn,
Gennadij Turkov, Fra Gaeta,
Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
ikk@free.fr

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata
revuo por lernemaj, verkemaj,
iniciatemaj esperantistoj.
Interesaj homoj, freŝaj ideoj,
praktikaj rezultoj, belaj bildoj,
spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.komencanto.narod.ru

Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ
ĉe via landa peranto



**enciklopedieto
kun informoj kiel
telefoni el kaj al
eksterlando**

POŜKALENDARO

- kun spaco por fari notojn
- kun indiko de la festotagoj en diversaj landoj

ENCIKLOPEDIETO

- kun ŝtatoj de l'mondo
- kun ĉefurboj, loĝantoj ktp.
- kaj multe pli

La Jaro 2009

via poŝamiko dum la tuta jaro 2009



Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen
www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be
aŭ ĉe via Monato-peranto (vidu liston kaj prezojn en p.4)

Certiĝu pri ĝustatempa livero, kaj mendu jam nun
por la 3 venontaj jaroj (-5%) aŭ por la 5 venontaj jaroj (-10%)